

# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

rm

**KATOLIKA SENTO**
BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

nº 11

53a Jaro Novembro 1974

## 35a I.K.U.E.-KONGRESO

AL ĈIUJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ:

la venontan jaron ni kunvenos en Romo por gajni la spiritajn fruktojn de la Sankta Jaro, la jubilean indulgencon, kaj por celebri nian 35an IKUE-kongreson.

Ni omaĝos al Sankta Patro de la tuta katolikaro, Papo Paŭlo 6a, kiu enkondukis oficiale nian internacian lingvon en la liturgian diservon.

Mi estas certa, ke tiu venontjara kongreso montros la veran aspekton de la esperantista katolikaro, ĉar ĝi okazos en nia plej taŭga medio, en la plej favoraj cirkonstancoj.

Ni kunvenos en Romo dum la tagoj 11-16 de aŭgusto 1975.

Nia bulteno eldonos detalojn pri tiu kongreso. Vi komencu programi ĝin!

D. Ferdinando Longoni

PER LA ALVOKO de nia IKUE-prezidanto, la aliĝoj estas malfermitaj.

Ni kongresos en la moderna kaj belega "Domus Pacis",

loĝejo kapabla akcepti kelkcent personojn (laŭ plena aŭ duona pensiono; kun dulita ĉambro, vastegaj salonoj, ktp.). Ni preferis elekti duonan pensionon por permesi al ĉiuj - ekster la laboroj de la kongreso kaj la ritoj por la akiro de la Jubilea Indulgenco - eblecon de viziitoj kaj ekskursoj en Romo.
Aliĝkotizo, kiun oni devas tuj sendi al P.Jacobitti kune kun la anonco de partopreno:
10.000 liroj, ĝis la fino de ĉi tiu jaro; aŭ 13.000 ĝis la fino de marto 1975; aŭ 16.000 ĝis la fino de junio.
(it.l. 10.000 = svisaj fr. 42,725; gld. 40.-; dol.15,15)
Ne abonintoj al Katolika Sento bv. aldoni £. 2.000 por ricevi nian revuon, kiu iom post iom aperigos ĉiujn necesajn informojn.

EN LA KADRO DE LA 45a Itala Esperanto-Kongreso okazinta en Verono de la 14a ĝis la 19a de sept. oni celebris du S.ajn Mesojn en esperanto.

Dimanĉe, je la 18,30 en la preĝejo "Sankta Paŭlo" amase kunvenis la kongresanoj al kiuj aldoniĝis la kutimaj lokaj fideluloj.

Kuncelebris la jenaj esperantistaj pastroj: mons.E.Violi, F.Ruaro, R. Di Prinzio, D.Zotti, D.Magnani, A. Ciccanti.

Laŭdire, temis ĉijare pri rekorda nombro de kuncelebrantoj, se oni konsideras, ke dum la festotagoj la pastroj estas aparte okupataj en siaj preĝejoj.

Ĉu eble tio estas unu el la reagoj al la kunveno por pastroj okazinta fine de pasinta aprilo en Rimini? Efektive, tie oni evidentigis i.a., ke urĝas informi la pastrojn pri esperanto.

Marde, je la 18 okazis la kunveno de UECI-anoj partoprenantaj en la kongreso. Oni tie raportis pri la ĵus

okazinta IKUE-KELI kongreso en Hamburgo, pri la ekumena Diservo kaj la IKUE-kunveno dum la U.K. Pastro Ciccanti, ĵus vizitinta en Romo p.G.Jacobitti, raportis pri la lastaj atingoj de esperanto kiel liturgia lingvo; aparte li informis pri la Misalo survoje al presado kaj pri la decidita dato de la IKUE-kongreso en Romo, de la 11a ĝis la 16a de aŭgusto 1975, en la kadro de la Sankta Jubilea Jaro.

Sekvis la Sankta Meso por la esperantistaj mortintoj kun aparta mencio pri tiuj,kiuj mortis en la pasintaj monatoj. Partoprenis en ĝi la plejparto de la kongresanoj, kaj multaj el ili ricevis la S.an Komunion.

Oni povas nur rimarki, ke krom la Meso dum la inaŭgura tago de la kongreso, estas ĉiam pli ŝatata kaj vizitata la Meso por la mortintoj. Pro tio, oni konsilas antaŭvidi kaj fiksi ĝin estonte en la programo, laŭeble sekve de la UECI-kunveno, prefere posttagmeze antaŭ la vespermanĝo.

NI RICEVIS KUN PROFUNDA bedaŭro sciigon pri morto de p. Henriko Wannemakers, S.J. La patro, valora esperantisto, dediĉis sian vivon al la servo de la religio pere de Esperanto. Dio, kiu pro siaj nesondeblaj planoj, permesis ĉi tiun novan doloran perdon inter la katolika esperantista mondo, veku novajn sindediĉajn homojn, kiuj pluirigu ĉi tiun movadon al la sankta celo de disvastigo de la dia regno sur la tero, pere de la lingvo, kiu povas kunigi ĉiujn homojn. Kaj li akceptu en la eternan loĝejon sian fidelan serviston!

S-ANO DICK DE BOER atentigas nin pri ne preciza informo donita je la unua paĝo K.S. n-oj 7-8, pri komunaj kongresoj. Nome, kvankam estis farita propono,ke ili okazu ĉiun kvaran jaron, oni preferis ne fiksi ion

definitivan, sed lasi tion al la evoluo de la tempoj.

## ROMA ESPERANTA VOCO
## n° 133

ANTAŬVIDE DE LA UECI-Kongreso oni decidis organizi laŭ novaj bazoj la Roman esperantistan Asocion,kiel Sekcion de UECI. D.ro Angelo Scalia, en konsento kun P.Jacobitti, pastra asistanto, kaj kun aliaj romaj samideanoj, proponis inviti ĉiujn anojn de la "Centro Esperantista Cattolico Romano" aliĝi al ĉi tiu grupo, kiu havos kiel eble frue sian unuan Asembleon.La inicinto mem kolektos la kotizojn: 2000 lir. por aliĝi al UECI kun abono al "Katolika Sento", kaj 1000 lir. por la Roma Sekcio), kiujn li transdonos al UECI-kasisto, d.ro C.C.Ferrari. Pro tio ĉiuj romaj s-anoj, dezirantaj partopreni en nia reorganizita Katolika Esperanto Grupo, estas petataj sin turni al: D.ro Angelo Scalia - Via Nocera Umbra, 178 - 00181 Roma - tel.794;10.69. Ni varme esperas, ke la zorgoj de ĉiuj interesiĝantoj kaj la allogo de la Kongresevento notinde kreskigos la nombron de la aliĝoj.

P.JACOBITTI, NOME DE LA ROMAJ katolikaj esperantistoj, dokumentis la Sinodajn Patrojn pri la feliĉa solvo, kiun donis al la mondo la internacia lingvo, per kiu ĉijare pli ol okdek internaciaj kongresoj aŭ studkunvenoj okazis en la plej diversaj partoj de la mondo.Estas konate, ke kvankam estis rekomendite dum la Sinodo paroli en la latina lingvo, granda parto de la Patroj preferis sian nacian lingvon, tiel malebligante komprenon al pli-malpli vastaj sektoroj de la asembleo.

BONFARA KASO. Pro malavara donaco de anonimo, de kiu ni ricevis 83.000 lirojn, ni atingis en nia kaso la sumon de italaj liroj 136.000. Pro tio en la pormisia tago ni transdonis por la misioj de Pakistano, kiel ni jam plurfoje faris, cent mil lirojn, nome de la katoli - kaj esperantistoj.

RADIO ROMA-ESPERANTO - La programo okazas ĉiun dimanĉon, de la 21a horo ĝis la 21,20, laŭ mezeŭropa tempo, sur ondlongoj (rimarku la novajn mezurojn):

| | | | |
|---|---|---|---|
| metroj | 41,15 | 41,24 | 49,92 |
| kilohercoj | 7.290 | 7.275 | 6.010 |

La programo temas pri Novaĵoj el Italujo", "Kuriero de Esperanto", kaj "Leterkesto".
Por viaj informoj, sugestoj, rimarkoj, skribu al: R.R. Esperanto; C.P.320, I-00100 (Italujo); aŭ al la Redaktoro: D.ro Antonio De Salvo, C.P.4017, I-00100 Roma Appio- (Italujo).

---

## El la Katolika Eklezio

---

EN LA ROMA EKLEZIO la plej grava evento de la oktobra monato estis la 4a episkopa Sinodo. Por tio kuniĝis en Romo 207 "sinodaj patroj". Inter ili estas 143 delegitoj de ĉiulandaj episkopaj konferencoj, 10 religiuloj elektitaj en kunsido de ĉiuj ĝeneralaj superuloj, 17 ĉefoj de la departementoj de la roma kurio, la ĝenerala sekretario de la Sinodo, kaj 22 inter kardinaloj kaj episkopoj elektitaj de la Papo mem. La sinodo, sugestita de la Dua Vatikana Koncilio, kaj kreita de Paŭlo 6a ekde la komenco de sia pontifika agado, devas daŭrigi tiun apogon al la Papo, kiun donis al li la Koncilio. Ĉi

tiu institucio funkciados ne permanente sed per kunsidoj, kiuj povas esti kunvokitaj en ĝenerala, eksterordinara aŭ speciala asembleo, laŭ neceso, sed normale ĉiun trian jaron.
Ĝiaj decidoj povas ankaŭ fariĝi ekleziaj leĝoj sed nur per speciala papa deklaro. La temo, "evangelizado de la nuntempa mondo", kribrita inter la multaj proponoj faritaj de episkopaj konferencoj per sinsekvaj voĉdonoj, estis fine decidita de la Papo por la aktuala Sinodo.
Ĉi tiu, 4a ekde ĝia institucio, malfermiĝis je la 28a de septembro per mes-kuncelebrado (v. foton) kaj preĝforma alparolado de la Papo, kies tekston ni volas integre doni al niaj legantoj:

## PAŬLO 6a AL LA SINODAJ PATROJ KUNVENINTAJ EN LA SIKSTA KAPELO

Sinjoro Jesuo, ni ne kapablas esprimi, se ne en preĝa formo, la temon de ĉi tiu alparolo, kiu antaŭas la Episkopan Sinodon nun malfermotan.

Komencante niajn studojn kaj niajn diskutojn pri "la evangelizado de la nuntempa mondo", Ni precipe dezirus tuj esplori la spiritajn bezonojn de ĉi tiu mondo kaj la eblecon de apostoleco, kaj malkovri la vojojn kaj la metodojn, kiuj igu pli efika la ĉeeston de la Eklezio.


Tial plaĉas al Ni antaŭ ĉio turniĝi al Vi, por konfirmi en nia animo ĉi tiun certan kredon: ke la fakto mem de la evangelizado venas de Vi, Sinjoro. Simile al rivero, ĝi havas sian fonton de agado; kaj Vi, Kristo Jesuo, estas tiu fonto. Fakte, Vi estas la aŭtoro de ĉi tiu mirinda evento en la historio de la homoj, Vi estas ĝia kaŭzo efika kaj transcenda: de Vi Majstro, de Vi Savanto, de Vi komenco kaj modelo, de Vi Pontifiko kaj hostio por la savo de l' homaro, komenciĝis la apostoleco, kaj ĝi estis konfidita al la elektitaj disĉiploj, de

Vi nomitaj Apostoloj, kaj de la Apostoloj, per neniam interrompita sinsekvo, ĝi alvenis al ni, Episkopoj.Via parolo, kvazaŭ flamo disvastiĝanta tra la tempo kaj tra la historiaj epokoj, alvenas ĝis ni, dolĉega kaj samtempe ordona, ĉiam viva, ĉiam nova, ĉiam aktuala:"Sicut misit me Pater, et Ego mitto vos" (Kiel la Patro sendis min, ankaŭ mi sendas vin) (Jo. 20:21).

Tial, Sinjoro, nia menso devas supreniri ĝis la mistero de la Sanktega Triunuo, por ke ni trovu la unuan originon de la mandato superstaranta kaj urĝanta nin, kaj por ke, priserĉante la neatingeblan profundecon de la dia vivo, ni malkovru la planon de amo, kiu trapenetras, kvalifikas kaj subtenas nian apostolan misión.

Tamen, kiel tio povas okazi? Ni estas tiom malgrandaj, ke ni kvazaŭ solecaj perdiĝas en la grandega oceana vasteco de la historio kaj en la senfina amaso de la homaro; kiel, do, ni povas esti elektitaj por misio tia kaj tiom grava?

Jen, Sinjoro, en ĉi tiu sankta momento, en kiu ni sentas nin forte konsciaj pri nia tasko, ni koncize prezentas niajn spiritajn travivaĵojn. Ni memoras la profetan kanton de Maria: "respexit humilitatem ancillae suae..., fecit mihi magna qui potens est" (Li rigardis la humilecon de sia sklavino..., la Potenculo faris al mi grandaĵojn) (Lk. 1:48,49). Laŭ analogeco, devenanta de la supera alteco de la Beatega Dipatrino, ankaŭ ni estas elektitaj, certe ne pro la homa valoro de nia persono, sed probable ĝuste pro nia malgrandeco; kaj tion Vi faris, por ke, en la plenumado de la Mesia tasko, kiun Vi volis al ni konfidi, ne kreu ian dubansencecon kiu ajn homa valoro nia, sed ĝuste el nia malgraveco pli klare montriĝu Via agado en nia humila ofico, kaj krome motivo al ni de humileco kaj fido estu Vorto Via, ho Jesuo Majstro: "Non vos me elegistis; sed Ego



elegi vos et posui vos, ut eatis et fructum afferatis et fructus vester maneat..." (Ne vi elektis min, sed mi elektis vin kaj vin starigis, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru) (Jo. 15:16). Ho personaj kaj intimaj travivaĵoj, per kiuj ĉiu el ni estas vokita al Via sekvado, Sinjoro, al via servado, al Via sacerdoteco, en kiu ni partoprenas pro tute speciala motivo sekve de la episkopa ordinado! Kiom da certeco penetras de tie en niajn animojn, por ke, ĝis la fino de ĉi tiu nia vivo surtera, ni alfrontu la specialajn kaj krudajn okazaĵojn prezentiĝantajn en la misio al ni konfidita! Kiom forta kaj dolĉa ĉeno subtenas la nesanigeblan kadukecon de nia homa naturo, al kiu aldoniĝis plia malforteco fare de la kritika kutimo, karakteriza de la nuntempa homaro. Jen la ĉeneroj de ĉi tiu logika kaj savoporta ĉeno, de kiu ni estas subtenataj: unua sendube estas la sincera aŭtentikeco de nia sacerdoteco, ĉar ja aŭtentika estas la katolika sacerdoteco; la dua estas entenata en ĝia firma efiko, ĉar ĝi validas pro sia triobla valoro, de instrumisio, de ofico, de paŝtista gvidado! la tria troviĝas en la intima vivado, kiun la sama sankta tasko ne nur permesas sed eĉ ordonas, ke ni havu kun Vi, Kristo, kiu estas la unua el ĉiuj amikoj kaj ĉiam la plej fidinda; tiel ke ni favoru Vian volon de savo kaj eniru en tiun fluon de amo, je kiu Vi flagras por la homoj.

Krome, aliaj rilatoj aldoniĝas al la menciita neegaleco inter niaj nefirmaj fortoj kaj la mandato, kiun Vi ordone komisiis al ni: antaŭ ĉio la fido, kian Vi ofte penetrigis en la korojn de viaj disĉiploj, fido, kiu preskribis al ni la kuraĝon kiel devon, fido, kiu nin instigas entrepreni iniciatojn, alporti la evangelian vorton al la tuta mondo, kaj persisti, trans la kalkuloj de la homa oportuneco, ĝis la fino. Kaj kun tiu fido estas kunigenda la espero: "Spes autem non confundit" (Kaj

la espero ne seniluziigas) (Rom. 5,5); kaj fine, ja ĉi- am la karitato: "Quis nos separabit a caritate Chris - ti?" (Kiu nin disigos de la karitato de Kristo?). Ni a- parte memoras, ni bone memoras ĉi tiujn fajrajn vor- tojn de la Apostolo, kiuj prezentas garantion sen limoj kontraŭ kiu ajn malfacilaĵo en la plenumo de la peniga tasko, malfacilaĵo, kiun la evangelizado de la mondo kontraŭmetas al ni homoj vivantaj inter homoj, al ni se nigitaj je kiu ajn surtera povo, al ni malriĉaj je mate - riaj havaĵoj.

Sinjoro Jesuo! Jen ni pretaj al ekagado kaj provizi- taj por plu anonci Vian Evangelion al la mondo, en kiu, laŭ la mistera sed tre amema plano de Via Providenco, ni troviĝas por pasigi la vivon. Ho Sinjoro, petu - ki- el Vi promesis - la Patron, por ke li perė de Vi sendu al ni la Sanktan Spiriton, la Spiriton de vereco kaj forteco, la Spiriton de kompleta konsolo, kiu igu mal- fermita, bona kaj efika nian ateston; kaj restu, ni pe- tas, ĉiam kun ni, Sinjoro, kaj faru, ke ni ĉiuj estu u- nu en Vi, kaj kapablaj transdoni al la mondo Vian pa- con kaj Vian savon. Amen.

tr. C.M-P.M.

Post la meso, la Ĝenerala Sekretario de la Sinodo, mons. Rubin, raportis pri la laboroj de la Sekretaria- to inter la jaroj '71-'74, kaj la ĉefep. de Fortaleza, (Brazilo) donis vastan rigardon pri la rilatoj de la San kta Seĝo kun la orientaj Eklezioj, kun la episkopaj kon ferencoj kaj pri interŝanĝo de informoj kaj de spertoj rilate la vivon de la Eklezio.

Post ĉi tiu tutmonda panoramo sekvis aparta raporto pri la kvin kontinentoj, donita de kvin kvalifikitaj epi- skopaj delegitoj. La unuigaj punktoj de la kvin raportoj estas: valoro kaj atesto de la persona kaj liturgia pre-

ĝado; respondoj al la problemoj de la junularo en la nuntempa mondo; homa progreso, kiel parto, kiu integrigas la evangelizadon; ekumenismo, kiel postulo de ĉiuj lokaj Eklezioj.

Dum la sekvantaj tagoj multaj Patroj viciĝis raportante pri la studoj de la episkopaj konferencoj, kiuj diskutis la temon, ilustrante la laborojn deciditajn kaj la faritajn, la spertojn akiritajn kaj la mankojn konstatitajn, donante tre interesan bildon de ĉiuj lokaj Eklezioj.

Post la interŝanĝo de spertoj en la kampo de la evangelizado, donita de 88 intervenoj en la salono kaj de 20 transdonitaj per manuskripto, kard. Kordeiro, ĉefepisk. de Karaĉo, je la 5a de oktobro sintezis ĉion, reliefigante interalie la nuntempan emon altiri la atenton de la Eklezio al sociaj problemoj, al oficialigo de la virina agado ktp. Post lia resumo estis komisiitaj dek du studogrupoj por pli profundigi apartajn malfacilaĵojn.

Post la interŝanĝo de la komunaj spertoj, je la 8a de oktobro komenciĝis la dua parto, kiu rilatis al la prilumado de la teologiaj temoj, koncernantaj la evangelizadon. Malfermis la traktadon kard. Wojtyla, ĉefepiskopo de Krakovo. Ankaŭ en ĉi tiu parto viciĝis dum pluraj tagoj intervenoj de episkopoj, kaj multaj estis ankaŭ prezentitaj skribe. Resumis denove kard. Wojtyla, memorigante la temojn priparolitajn: problemoj de rilatoj inter la evangelio kaj la indiĝenaj kulturoj; de rilatoj kun nekristanaj religioj; liberiĝo, laŭ ĝiaj teologia, morala kaj socia aspektoj; sekularigo kaj sekularismo; kaj programita ateismo aŭ radikala malakcepto de ĉiu religio. Post tiu raporto, la apartaj komisionoj kuniĝis por diskuti pri respondoj kaj klarigoj, estiĝintaj el la diskutado.




Vidu pri ĉi tiu foto je paĝo 264a

Fine la impona laboro de la Sinodo, de longe kaj zorge preparita, alvenis al sia konkludo. Kaj je la 26a de oktobro ĝi fermiĝis post la lasta resumo (kard. Koenig), kun fina mesaĝo, preskaŭ unuanime aprobita, kaj kun papa parolado, kiu esprimis sian dankemon pro la grandega helpo al li donita de la kvalifikitaj membroj de la episkoparo je avantaĝo de la tuta Eklezio.

Menciante la pozitivajn fruktojn de ĉi tiu asembleo, la Papo memorigis aparte la komunan konsenton pri la distingo, integrigo kaj subordigo de la problemo de la homa progreso kompare kun la evangelizado; li reliefigis, ke la respondeco de ĉi tio apartenas institucie al la episkopoj, kunligitaj kun la roma Pontifiko, kaj ke kun ili kunlaboras unue sacerdotoj, sed ankaŭ religiuloj kaj laikoj, junuloj kaj gepatroj. Ke la evangelizado devas esti prezentata kun la spirita, doktrina, evangelia vivo; ke respekto necesa al aliaj religioj tute ne devas signifi rezignon pri pureco kaj unueco de iu ajn punkto de la katolika kredo. Ke oni prave deklaris, ke "la Eklezio de Kristo, kiu ekzistas en la katolika Eklezio, estas samtempe objekto kaj subjekto de evangelizado. Ke eĉ ekster ĝi povas, laŭ dia plaĉo, esti prilumado fare de la dia Vorto; sed la integreco de la dia mesaĝo, kun ĉiuj savrimedoj kunligitaj - sakramentoj, liturgio, klara kaj senerara prezentado de la Kristevangelio -, troviĝas nur en la hierarkia Katolika Eklezio, nome en komuneco kun la supera Paŝtisto, posteulo de Petro".

Oni agnoskis, ke la evangeliaj taskoj estas tiel vastaj,

ke ne eblas esprimi ĉiujn iliajn aspektojn kaj devojn per unu dokumento. Sed tio nenion forprenas el la riĉeco de la plenumita laboro. Ke hodiaŭ multaj eksteraj rimedoj, kiel arto, vivo kaj progreso de tekniko, estas je dispono por la ĝoja anonco.

La Papo menciis ankaŭ pri kelkaj punktoj, kiuj postulas pli profundan esploron, kiel la rilatoj inter la lokaj Eklezioj kaj la Apostola Seĝo. Fakte, la interveno de la Papo kun ili "ne povas esti limigita al kelkaj eksterordinaraj okazoj. Ne - deklaris humile sed firme la Papo - ni ripetas tremante pro la respondeco, kiu pezas sur ni: la Papo estas kaj restas la komuna Paŝtisto de la tuto: pro sia ofico, kiel Vikario de Kristo kaj Paŝtisto de la tuta Eklezio, li havas la plenan, superan, universalan povon, kiun li ĉiam laŭvole povas uzi".

Kaj pri kredesprimo li diris: "Danĝere estas paroli pri teologioj diversaj laŭ kontinentoj kaj kulturoj. La enhavo de la kredo aŭ estas katolika, aŭ ĝi ne estas tia ... Petro kaj Paŭlo ne alivestis la kredan tradicion por adapti ĝin al la antikva judea, greka, romia mondo, sed ili zorgis pri ĝia aŭtentikeco".

Li insistis ankaŭ pri la duaranga loko de la libereco laŭ la socia, kompare kun la evangelia senco. Li same admonis, ke la malgrandaj komunumoj estus fortranĉitaj de la Eklezio, se ili ne estus sub ĝia legitima aŭtoritato.

Kaj fine, la Papo salutinte kun emociaj vortoj la ĉeestantajn episkopojn, konkludis per preĝo:

"Sinjoro Jesuo Kristo, Vorto de la Patro, krucumita Savanto, al vi ni turnas nin en ĉiu konkluda horo de la Sinodo, kiel jam ni vin alvokis en ĝia komenco. Inter ni vi estis, kaj „ĉu nia koro ne brulis, dum vi parolis kun

ni sur la vojo, klarigante al ni la Skribojn? „(v. Lk. 24-32). Gardu, Sinjoro Jesuo, niajn proponojn, vigligu nian eklezian servadon, prilumu niajn mensojn kaj donu forton al niaj vortoj, subtenu niajn laborojn, gvidu niajn paŝojn en priserĉado de la plej taŭgaj vojoj por anonci vian Evangelion, kaj pardonu niajn mankojn. Ni estas viaj humilaj servantoj kaj nur la certeco de via promeso estas nia forto. Subtenu Petron, subtenu viajn episkopojn, kuraĝigu iliajn gregojn. Vidu: nia malriĉeco estas granda; sed ni fidas ne nin mem, nur vin: nia riĉeco estas ĉi tiu fido. Kuraĝigu nin, certigu nin, donu al ni vian benon. Vi, kiu kun la Patro kaj kun la Sankta Spirito vivas kaj regas en ni kaj en via Eklezio, en ĉiuj jarcentoj. Amen."

LA ITALA TELEVIZIO PROGRAMIS kvar religiajn servojn rilatajn al la Sinodo , dum kiuj parolis pluraj Sinodaj Patroj, kardinaloj kaj episkopoj. La unua okazis la kvaran de oktobro, vendrede, je la 19,50 horo; la aliaj estis dissendataj respektive la 11an, la 18an kaj 25-an de oktobro, tio estas en la sekvantaj vendredoj, je la sama horo.

JE LA 22a DE OKTOBRO ESTIS INAŬGURITA de la Papo apud la salono de la aŭdiencoj, elmontro pri la vizaĝo de Kristo en la moderna arto. "Kiel la muziko - diris la Papo - ankaŭ bildarto povas doni evangelizan rimedon unuarangan, tamen kompreneblan per la sensoj, precipe por niatempa homaro, pli malfermita pri la lingvo de la sensoj ol pri tiu de la menso. Ĉi tiu elmontro estas modesta, sed alloga invito por realvoki la modernan arton, kun ĝiaj kvalitoj de beleco kaj de interna voĉo, al la servo, al la honoro de la evangelizado".

LA PORMISIA TAGO (20a de oktobro), kiu devis me-

morigi al la tuta Eklezio la temon de la evangelizado de la mondo, estis celebrita de la sinodaj Patroj kun la Papo en la Pontifika Instituto de "Propaganda Fide" per parolliturgio en la ĉefa aŭlo de la Universitato, por alvoki la gracon de la Sankta Spirito sur la misiojn.

En la Instituto tricent studentoj el ĉiu lingvo kaj nacio sin preparas por fariĝi misiistoj de la katolika Eklezio. La Papo tiuokaze tagmanĝis kun la sinodaj Patroj kaj kun la lernantoj de la instituto. Kaj oni rimarkis tiun fakton kiel unikaĵon en la historio. En la manĝosalono, la dua loko post la Papo estis tiu de kard. Angelo Rossi, prefekto de la Sankta Kongregacio por la evangelizado. Interalie li anoncis, ke aperis volumo pri la historio de tiu antikva eklezia Kongregacio. Ĉi tiu hodiaŭ direktas 853 ekleziajn departementojn, kun 38.575 sacerdotoj, 99.957 religiuloj kaj 63.700.000 katolikoj. De ĝi dependas 397 malsuperaj seminarioj kun 35.208 lernantoj kaj 94 superaj, kun 8.243 seminarianoj. Ĝi ankaŭ helpas en la misioj 37.215 elementajn lernejojn, 6.548 mezgradajn kaj 342 superajn, kun 11.117.936 lernantoj. Krome ĝi helpas 10.000 entreprenojn pri asista agado.

ELEKTITAJ 30 NOVAJ MEMBROJ de la internacia teologia komisiono por la proksima kvinjara periodo. La Papo elektis por partopreno en ĉi tiu komisiono - deli kreita en aprilo 1969 - 4 teologojn el Francujo, po 3 el Italujo kaj Okcidenta Germanujo; po 2 el Usono, Hispanujo, Belgujo, Orienta Germanujo kaj Kanado; po 1 el Filipinoj, Svisujo, Pollando, Brazilo, Nederlando, Britujo, Ĉilio, Zairio, Libano kaj Jugoslavio. Dek tri el la antaŭa komisiono restis, kaj restis la Sekretario de la Organizo, la belga mons. Philippe Delhay.

LA ĜENERALA KAPITULO de la Dominikana ordeno (23 aŭgusto - 26 septembro) elektis novan Generalon: li estas la franca patro Vincento De Couesnongle. Ĉeestis 133 kapitulaj Patroj, reprezentantoj de la 41 provincoj de la Ordeno, dissemitaj laŭ 30 ŝtatoj. La nova generalo, 83a posteulo de Sankta Dominiko, havis dum la lastaj jaroj respondecajn taskojn en la ĝenerala kurio de la Ordeno, kaj ofte gravajn kaj delikatajn komisiojn, kiujn li plenumis kun sukceso.

LA PONTIFIKA GREGORA UNIVERSITATO memorigis je la 15 de oktobro la 422an datrevenon de sia ekzisto. Ĝia rektoro, P. Hervé Carrier, celebris la eŭkaristian liturgion kun multaj sacerdotoj profesoroj kaj studentoj, kaj en sia homilio li legis kelkajn punktojn de raporto, kiu laŭ pli ampleksa formo estis disdonita post la meso al la partoprenintoj. En la raporto, la Rektoro akcentante la tri gravajn ĉijarajn eventojn: Sinodo, Jubileo, 7a jarcento depost la morto de la sanktaj Doktoroj Tomaso kaj Bonaventuro, prilumis la rilatojn de ĉi tiuj eventoj kun la Universitato vere eklezia kaj internacia. Fakte, pli ol dumil estis la nombro de la studentoj en la ĵus pasinta jaro, el 76 nacioj, 454 diocezoj kaj 74 religiaj institutoj. Dum ĉi tiuj lastaj jaroj ĉeestis ankaŭ multaj studentinoj: 446 pasintjare. La instruistaro atingis la nombron de 260 profesoroj; el kiuj 36 kunlaboras ankaŭ en romaj Kongregacioj kaj Sekretariatoj de la Sankta Seĝo. Krome, la profesoroj partoprenis en multaj kongresoj kaj kunvenoj aŭ prelegis en ĉirkaŭ 170 urboj el 36 malsamaj nacioj, kaj la Gregora Universitato per siaj sciencaj publikaĵoj - volumoj aŭ periodaĵoj - interrilatas fakte kun la tuta kultura kaj religia mondo, disvastigante doktrinon, kiu celas reflekti la radiojn de la eterna vero.

APERIS LA"LIBRO DE LA PILGRIMANTO", poŝforma-ta, zorge de la Vatikana "Poliglota Eldonejo". Ĝi estos donita al ĉiu pilgrimanto por ebligi la plenan komprenon de la Jubileo.

La libro, kiu estos per si mem tre alloga, estas tamen por ni esperantistoj nova pruvo de la taŭgeco de la internacia lingvo, ĉar la gvidilo, por plenumi la internaciajn postulojn de sia celo, sin prezentas en 6 lingvoj, nome la latina, itala, franca, angla, germana, hispana kaj portugala. Tio evidentigas la grandegan ŝparon, kiun ebligas unu internacia lingvo pri mono, pri tempo, pri papero ktp.

La libro entenas 421 paĝojn, dividitajn laŭ du partoj:la unua, kun kvar ĉapitroj: "Jaro de la boneco"; "Ĉe la sojlo de la apostoloj"; "Pri Urbo kaj mondo"; "Ho nobla Romo". La dua parto entenas la Liturgion de la Sankta Jaro. nome la celebrajn ritojn en Sankta Petro kun muziknotoj, por ke ĉiuj fideluloj kuniĝu harmonie.

LA ĈEFMINISTRO DE MALTO, Dom Mintoff, renkontiĝis en Vatikano kun la Sekretario de la Konsilantaro por la publikaj aferoj de la Eklezio, mons. Agostino Casaroli. Informis pri tio "kuna raporto" Sankta Seĝo -Malto, en kiu estas dirite, ke Dom Mintoff estis akompanata de la advokato por la Ŝtato, Mizzi, kaj de la Ambasadoro de Malto ĉe la Sankta Seĝo, Paŭlo Ferrugia, por diskuti kune dispoziciojn koncernantajn la Eklezion, kiujn la malta registaro intencas inkludi en la ŝtataj konstituciaj leĝoj reviziitaj kaj ĝisdatigitaj.

ĈADIO - Afriko - ĈEESTO DE LA EKLEZIO en muzulmana mondo. El la kvar dioçezoj de Ĉadio, nur tiu de N' Djamena, gvidata de mons. Paŭlo Dalmais, daŭre kontaktas kun muzulmanoj. Intensa, kvankam malfacila

estas ĉi tiu paŝtista agado. Ĝi sekvas du direktojn: misia agado ĉe muzulmanaj medioj pere de sportaj grupoj, kulturaj centroj ktp. Kaj krome paŝtista agado per komunaj celoj kristanaj-muzulmanaj, kiel la eldonado de "Ĉadi-Kulturo", la Centro por Socia Agado, la Asocio pri Kampara Junularo, kiu okupiĝas pri profesia kaj humaneca formado de junuloj. Kontribuas al ĉi tiuj agadoj 44 misiistaj jezuitoj kaj kelkaj sacerdotoj "Fidei donum" el Francujo, kun 3 "Fratetoj de Charles de Foucauld", krom kvindeko da religiulinoj el pluraj kongregacioj.

Azio - HINDUJO. SPECIALA ELMONTRO de la relikvoj de Sankta Francisko Savero estos organizita en decembro en Goo, kien la korpo de la sanktulo estis transportita, tuj post lia morto, decembre de 1552, post lia kuraĝa klopodo starigi mision en Ĉinio.

Tiuokaze la goa registaro sin devigis restaŭri preĝejojn kaj monumentojn, kiuj memorigas la sanktulon. Ankaŭ la plej gravaj stratoj de la urbo estos plibonigataj, antaŭvide de la granda alfluo de pilgrimantoj. Kaj oni zorgos, por ke dum la festadoj estu pliigitaj nutraĵ-provizoj.

HINDUJO - LA DEK TRI EPISKOPOJ de Tamil Nadu, la plej suda ŝtato de la hinda duoninsulo, starigis en la diocezo de Kottar, misiistan porpastran seminarion, kiu nun zorgas pri 35 lernantoj. La iniciato apartenis unue al belga misiisto p. Melard, kiu laboras en la regiono jam dudek kvin jarojn.

Tamil Nadu (antaŭ nelonge ĝi nomiĝis Ŝtato de Madras) havas multajn kristanojn, plejparte marbordajn fiŝistojn, kies komunumoj devenas de antaŭ kvar jarcentoj, kiam Hindujo estis evangelizata pere de jezuitoj kaj aparte

de S. Francisko Savero. Inter ĉi tiuj katolikoj multaj estas la vokiĝoj; pro tio P. Melard klopodis enkonduki, por la Tamil-lingvaj kaj -kulturaj junuloj, iniciaton similan al aliaj jam sukcese agantaj en la Kerala Ŝtato.

La seminario gastigas junulojn kaj asistas ilin dum tri jaroj de literatura kurso efektivigata ĉe la apuda jezuita lernejo kaj dum la unua jaro de universitata kurso. Je ĉi tiu momento la studentoj devos elekti diocezon de la norda Hindujo, kiu bezonas sacerdotojn, kaj tien ili transiros por plenumi siajn studojn kaj por ricevi poste la sanktan ordinon.

Novaĵo en la formada kriterio de tiu seminario estas teknikaj kursoj, kiuj estos enkondukitaj. La junuloj devos frekventi teori-praktikajn kursojn pri elektro-tekniko, mekaniko kaj agrikulturo.

Oni konstatis, ke venis la ĝusta tempo, por ke la katolikoj de Tamil Nadu plivastigu siajn horizontojn al aliaj regionoj ne entute kristanaj. La nura diocezo de Kottar havas 260.000 katolikojn el 1.200.000 loĝantoj, kaj multaj estas inter ĉi tiuj la konvertiĝoj.

JAPANUJO - KIEL JAPANOJ KONVERTIĜAS. Tre malfacile estas ordigi kaj interpreti statistikojn pri kredoj en Japanujo. Difino mem pri religio ŝajnas malsama en oriento kaj en okcidento. Fakte, multaj estas la religioj en Japanujo, kaj krome, la religiaj kolektivoj ne samaniere nombras siajn aliĝintojn. Ne ekzistas centra oficejo, kiu celas ion pli ol kolekti kaj registri statistikojn. Pro tio troviĝas multaj diferencoj kaj kontraŭdiroj. Tamen ŝajnas utile publiki ĉi tiujn statistikojn eltiritajn de enketo, laŭ iniciato de katolika semajna revuo "Katorikku Shimbun" de la 10a de februaro 1974.

Eĉ se ĉi tiu enketo estas jam iom malnova, la konklu-

doj, kiujn oni povas eltiri de tio, laŭ p. Allegrini, misiisto en Japanujo, estas ankoraŭ validaj kaj konformiĝas al lia 23jara sperto pri misio.

Ĉi tiu enketo estis farita antaŭ nelonge inter 485 el 6870 baptitoj. Inter ĉi tiuj, la virinoj estas 68 procentoj kaj la viroj 32 pc. El ĉi tiuj virinoj pli ol duono apartenas al familioj, en kiuj ili estas la unika kristano. Inter la edziĝintaj viroj, pli ol duono el ili havas edzinon jam kristanan. Tio montras la grandan influon, kiun povas havi kristanaj edzinoj pri konverto de la edzo.

Pri aĝo de la intervjuitoj la plej alta pc. troviĝas inter 20 kaj 30 jaroj. Pri instrugrado, 48 pc-oj vizitadis la superan lernejon; 32 pc-oj universitaton kaj 20 pc-oj vizitis nur la devigan (t.e. ĝis la tria mezgrada). Se oni pripensas, ke en Japanujo tiuj, kiuj plenumis la superajn studojn estas 22 pc-oj, tiuj, kiuj atingis la universitaton 5 pc-oj, kaj tiuj, kiuj limiĝis al la deviga lernejo estas 63 pc-oj, oni vidas, ke la nivelo de la lerneja instruado de la baptitoj superas tiun de la medio. El la enketo montriĝas ankaŭ, ke la kono de la religio estas larĝe influata de la kontaktoj kun la katolikaj lernejoj. Fakte la 43 pc-oj de la katolikoj havis rilatojn kun ili.

Pri la ekonomia situacio, la plej nombraj estas tiuj, kiuj apartenas al la mezgrada sfero, kun salajro inter 50.000 kaj 100.000 enoj (ĉ.300.000 - 600.000 it.£.); dum apenaŭ 4 pc-oj apartenas al tiuj, kiuj ricevas mal pli altan salajron. Oni klarigas, ke tio dependas ne de la fakto ke la Eklezio ne interesiĝas pri ili, sed ĉar la japana socio estas io tiel superstrukturita kaj masiganta, ke ĝi ne allasas liberan tempon por la individuo (por la plej parto de la japanaj laboristoj la jaraj ferioj ne estas pli longaj ol unu semajno); pro kio, tiuj, kiuj ĝuas iom pli da libera tempo estas dommastri -

noj kaj universitataj studentoj. Krome, la japano pro sia naturo ne inklinas al internaj kaj spekulativaj problemoj; kaj la religia problemaro postulas longan kontakton, kio fariĝas malfacila siavice pro renkontiĝa malofteco.

Por 30 pc-oj necesis pli ol tri jaroj da tiuj kontaktoj ; nur 24 pc-oj bezonis unu jaron. Preskaŭ ĉiuj estis instruitaj de sacerdotoj; sed inter virinoj 19 pc-oj estis instruitaj de religiulinoj.

La motivoj, kiuj altiris ilin en la katolikan Eklezion estas en ordo de graveco: 1) estimo al sacerdotoj kaj religiuloj, iliaj invitoj; 2) stimulado de amikoj kaj konatoj; 3) la katolika presaĵaro. Kaj tio, kio ĉefe altiris ilin estas: 1) la evangelia leĝo de la amo, 2) priserĉado de vivocelo, 3) influo de la sankta medio, 4) deziro de pli granda spirita forto.

Pri la malfacilaĵoj renkontitaj oni menciis la jenajn: 1) la mistero de la Triunuo kaj la mirakloj; 2) la emfazo donita al la peko; 3) formalismo; 4) malmultaj kontaktebleco j kun samkredanoj; malvarma sinteno de kristanoj.

Fine, inter la respondoj al demando: "Kion vi deziras de la Eklezio?" reliefiĝas la jenaj: 1) la Eklezio ne estas sufiĉe preta akcepti lastvenintojn kaj havas malvarmecan aspekton; 2) la Eklezio devus havi pli pozitivan sintenon rilate sociajn problemojn.

Sed, kiel ni diris, ne estas simpla afero interpreti ĉi tiujn statistikojn, ĉar la koncepto pri religio en Japanujo estas rimarkinde malsama de la nia, kiu postulas tutecan sindonon. Por japanoj, ekde jarcentoj, la religio estas duagrada vivaspekto, valida nur ĉe kelkaj cirkonstancoj. Ili ne estas, do, kontraŭaj al la religioj, sed ankaŭ ili ne estas striktasence religiaj, ĉar ili ne

starigas sian vivon laŭ religia kredo.

JAPANUJO - LA UNUA EKUMENA himnaro en la japana lingvo estos eldonata en Tokio dum 1975. La kolekto de la religiaj kantoj estos prizorgata de faka interkonfesia komitato, konsistanta el katolikoj, anglikanoj, baptistoj, luteranoj kaj membroj de la Japana Unuiĝinta Eklezio. La volumo, kiu titoliĝos "Kantoj de la nuntempa kredo", estos publikigita zorge de la eldonejo de la Unuiĝinta Eklezio de Japanujo. Per ĉi tiu iniciato la ekumena komitato celas redoni al la sanktaj kantoj unuecan kaj aktualan fizionomion.

JAPANUJO - LA KORESPONDA KURSO pri katolikismo, kiu komenciĝis aprile de 1972 en Tojonaka iniciate de P. Paŭlo Schrus CICM, atingis, fine de la ĵus pasinta jaro, 4070 korespondantojn, el kiuj 66 (21 viroj kaj 45 virinoj), je la fino de la kurso, ricevis bapton.

La kvinmonata kurso inkluzivas 15 lecionojn, ĉiu entenata en 24-paĝa kajero. Ĉiun dekan tagon unu leciono estas sendata poŝte al la abonintoj, kiuj trovas tie kunmetitan poŝtkarton kun tri aŭ kvar demandoj, al kiuj ili devas respondi poŝtrevene.

Laŭ la statistikoj donitaj de la Centro de Tojonaka, triono de la korespondantoj, nome 1.153 personoj ricevis atestilon rezervitan al tiuj, kiuj respondis al ĉiuj demandoj. Sendante la 15an kaj lastan lecionon oni petas de la korespondanto, ĉu li deziras ricevi prezentleteron por la plej proksima katolika preĝejo. Fine de 1973 estis prezentitaj tiel al iu sacerdoto 232 personoj ( 73 viroj kaj 153 virinoj).

La kurso de Tojonaka celas unue nekristanojn, precipe tiujn, kiuj pro materiaj aŭ fizikaj motivoj ne povas fre-

kventi regule kursojn pri kristana instruado: patrinoj kun malgrandaj infanoj, malsanuloj aŭ malhelpatoj, flegistinoj, laboristoj sen fiksa horaro aŭ laborantaj dum kromaj horoj ktp.

Sed la kurso ne ekskludas tiujn, kiuj pro iu ajn kaŭzo jam kontaktas kun la Eklezio; tiel inter ĝiaj lernantoj estas gepatroj, kies filoj frekventas katolikajn lernejojn; geedzaj aŭ fianĉaj paroj, kiuj deziras edziĝi en katolika preĝejo, k.s. Kvankam verkitaj laŭ simpla stilo, la lecionoj celas plenkreskulojn, kaj postulas lernonivelon ne malpli ol tiu necesa por superaj lernejoj.

SUDA VIETNAMO - LA JAPANA "KARITATO", kiu jam proponis havigi traktoron al ĉiu farmobieno, decidis krome, kunlabore kun la Priekonomia Instituto de Universitato "Sophia" en Tokio, organizi en la Suda Vietnamo kurson por instruado de teknikoj pri mekaniko kaj elektroniko. La kurso okazos en Sajgono kaj daŭros du monatojn. La instruistaro konsistas el 10-12 japanaj kaj vjetnamaj membroj, kaj la lernantoj estos preskaŭ okdeko. La elspezo, ĉ. 8.740.000 enoj, estos pagitaj de la du supre cititaj katolikaj organizoj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

OKAZE DE NIA VENONTJARA IKUE-Kongreso, ni opinias, ke plaĉos al multaj vidi sin denove (iom pli junaj!) en la foto (v.p.252-3) de nia 29a IKUE-Kongreso, kiu ricevis preskaŭ 300 aliĝojn. Tiam akceptis nin la Instituto "Por pli bona mondo", kies direktoron, P.Riccardo Lombardi SJ. oni vidas meze de la kongresanoj. Ĉifoje temas pri ne ambicia Kongreso, sed certe pli spirite ĝojiga kaj efika por la kristana vivo de la partoprenontoj. Ĉi tiu almenaŭ estas la sincera deziro de la organizantoj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

*Quota di abbonamento L.* **1500**

*Abonkotizo italliroj* **1500**

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE